# *Rusio ne preteratentos ajnan incidenton similan al la tragedio de Su-24*



La ministro pri defendo de Rusio, Serguei Shoigu, anoncis la haltigon de ?iuj militaj kontaktoj kun Turkio kaj la movon al Sirio de baterioj de la raketkompleksoj S-400 Triumf, en savgardo de la rusaj aerspacaj fortoj.

La decido de la stabo rusa enskribi?as inter la unuaj pa?oj adoptitaj de Moksvo depost la faligo  de bomb-avio Su-24 en siria teritorio tagon anta?e kun du pilotoj flanke de turka ?as-avio F-16. La komandanto de la avio forpasis kaj la dua esti rekuperita ?i-merkrede far komando de specialaj trupoj, la? raportas la informagentejo Prensa Latina.

La rusa flanko asertas ke la aviadilo ne perfortis la aeran spacon de Turkio, dum informoj de elektronika gvatado indikas ke la faligo de raketo okazis je unu kilometro de la landlimo, kiam la Su-24 flugis revene al la bazo en Latakia.

Surtere, armitaj grupoj kiuj batalas kontra? la siria armeo en la zono pafis kontra? la du rusaj pilotoj kiuj falis en para?utoj,  finmortigante unun el ili, la? videblas en video diskonigita de la ekstremistoj en la interreto.

Rusio ekde nun ne preteratentos ajnan incidenton similan al la tragedio okazinta en Sirio kun la bomb-avio Su-24, asertis Shoigu.

Li aldonis ke la? indiko de la ?efkomandanto de la armitaj fortoj, la prezidento Vladimir Putin, oni enpostenigos  sistemon de multoblaj raketoj S-400 Triumf en la siria militbazo de Jmeimim por kovri ?iujn liniojn kie operacas la rusaj spac-aeraj fortoj, kiuj batalas kontra? la Islaman ?taton kaj aliajn teroristajn grupojn.

La S-400 apartenas al raketsistemo de nova generacio ekipita per ses baterioj ?is 20 misiloj por detrui modernajn mediojn de spac-aeraj atakoj, inkluzive de kuglaj raketoj, ?is distanco je 250 km.

La ministro anka? informis ke la piloto rekuperita ?i-merkrede bone fartas en Latakia. Putin ordonis investi amba? pilotojn per la titolo  Herooj de Rusio, kaj kaze de la forpasinto, ?i estos  postmorta.

La estro de la stabo aganta Serguei Rudskoi asertis, siaflanke, ke Rusio ekde nun detruos ?iujn celojn konsideratajn potenciala dan?ero por sia aviado, plenumante ordonon de la Kremlin-estro.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/76906-rusio-ne-preteratentos-ajnan-incidenton-similan-al-la-tragedio-de-su-24

Radio Habana Cuba